



Olga Kerziouk apud la Ukraina parlamentejo (*Verkhovna Rada*) dum lasta tago de sia vizito en marto (vidu 12a aŭgusto)

### Kluba Programo:

#### julio:

- 1 Babil-vespero (IBIS)
- 8 John Wells: *Lingva Seminario* (Diorama) (1800h: konsilantaro)
- 15 Literatura diskutrondo (IBIS)
- 22 Babil-vespero (IBIS)
- 29 Babil-vespero (IBIS)

#### aŭgusto:


- 5 Literatura diskutrondo (IBIS)
- 12 Olga Kerziouk: *Impresoj pri mia vojaĝo al Ukrainio* (Diorama) (1800h: konsilantaro)
- 19 Babil-vespero (IBIS)
- 26 Babil-vespero (IBIS)

#### septembro:

- 2 Babil-vespero (IBIS)

### Esperanta Kalendaro:

23-30 julio 2016: 101a Universala Kongreso; Nitra, Slovakio. Informo: [www.nitra2016.sk](http://www.nitra2016.sk); [info@esperanto.sk](mailto:info@esperanto.sk)  
 9-12 septembro 2016: Internacia Amikeca Renkontiĝo; Aylesford, Kent. Informo: [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com)



Monumento al la fondintoj de Kijivo, Placo de Sendependeco, Kijivo, Ukrainio

### Aliaj anoncoj:

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la kluba sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por  
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo *London Overground*: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,  
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,  
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,

Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,

11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB

01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Anna Lowenstein, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: [lek.sekretario@gmail.com](mailto:lek.sekretario@gmail.com); Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

[ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk), Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com),

[anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com), Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Dek unu LEKanoj ĵus ĝuis promenon tra du Reĝaj Parkoj, sub seka ĉielo, la 24an de junio. Kvankam mi mem mezpromene vojerarigis nin for de Verda Parko anstataŭ en ĝin, tamen bona humoro de la grupo superis tion kaj ĉion. Multaj vidindaĵoj bone impresis la partoprenantojn, kaj naturaj kaj arĥitekturaj. Tiom da diversfaceta pejzaĝo (inkluzive Palacon *Buckingham*, *The Mall*, kaj Parkon de S-ta Jakobo), en tiel negranda spaco, meze de ĉefurbo! Jen vere sukcesa kunveno.

Parolante pri sukcesoj, la lastatempaj KER-ekzamenoj en Londono montriĝis taŭgaj ekzercoj por pluraj klubanoj. Oni ankoraŭ atendas finrezultojn, sed laŭdire la individuaj spertoj je preparado kaj ekzamenado estis ŝatate progresigaj. LEKano **RENATO CORSETTI** bone kaj lerte rekrutis por tiu afero. Ankaŭ sukcesa estis prelego pri Esperanto, fare de **ANNA LOWENSTEIN**, ĉe Publika Biblioteko de Muswell Hill, kie sufiĉe multaj ne-esperantistoj lernis pri la Lingvo Internacia.

Ni ja scias, ke venas la 'for-sezono', kiam samideanoj vojaĝos por kongresi ktp. Tamen, nia kolegino, **OLGA KERZJUK** jam revenis de interesege vojaĝo al Ukrainio. Venu do por ŝia prezento pri ĉio tio, en aŭgusto!

Kien ajn vi mem iros, bonvolu konservi kaj kompili viajn aventurojn, por la ĉi-jara Kongresaj Raportoj (kiuj pritemas ne nur kongresojn, sed ankaŭ aliajn renkontiĝojn kaj vizitojn en la tutmonda diasporo, kiu estas la esperantista komunumo). Klubanoj certe bonvenigos kaj atentos vin.

Bonan Someron!

*David Thornell*

